

# LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



**Jaargang 6, nummer 4 (34) november-december 2013**  
**Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.**

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 6, n-ro 4 (34): novembro-decembro 2013

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://  
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html) .

Ĉiu rajtas fotokopii aŭ plusendi la revuon.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

## *Karaj Gelegantoj!*

*Denove komenciĝas la periodo de la longaj vesperoj. Post tiom da jaroj televidado ne plu multe interesas min, escepte kelkaj elektitaj programoj kiel la ĉiutagaj novaĵoj. Mi preferas legi interesan libron ol rigardi sensencajn programojn. Nuntempe mi legas "La dek tagoj de kapitano Postnikov", originale verkita romano de Mikaelo Bronŝtejn, la tre interesa, sed tragika kaj tre bone skribita historio de militisto kiu fondis la Rusan Esperanto-Asociacion en la jaroj antaŭ la Unua Mondmilito kaj estis kondamnita al morto kaj ekzekutita en 1929 farla reĝimo pro sia rezisto kontraŭ la komunista diktaturo.*

*Se oni volas kutimiĝi al la lingvo por ke ĝi fariĝu nia "korpo kaj sango", kiel oni diras, kaj pligrandigi sian propran vortotrezoron, estas necese ofte kaj multe legi ĝin. Se ne, ĝi restos fremda al ni. D-ro Zamenhof sciis tion kaj tial tradukis diversajn verkojn en Esperanton por la unuaj esperantistoj, oferante grandan parton de siaj noktoj al tiu tasko .*

*Nuntempe ekzistas tiom da interesaj romanoj en Esperanto. Aĉetante esperantajn verkojn, oni ankaŭ subtenas la movadon. Sed se oni ne ŝatas posedi librojn, ĉiu klubo havas bibliotekon, kie oni povas senpage prunti librojn, kaj nuntempe en la interreto oni trovas centojn da libroj. Profitu de tiuj eblecoj. Ne restu liliputo en tiu lingvo ! Bonan legadon !*

*Pieter Jan Doumen*

## **Plua historio de Esperanto (7)**

### ***Verdere geschiedenis van het Esperanto (7)***

La delegitoj devas esti individuaj membroj, kaj ilia tasko estas enkasigi la kotizojn de la individuaj membroj, varbi novajn individuajn membrojn kaj fari diversajn servojn al la membroj. La delegiteco estas honora ofico. Ĉiu membro de U.E.A. rajtas uzi la servojn de la delegitoj.

Kun la peto pri servo oni devas ĉiam kunsendi servokuponon por montri ke oni estas membro. La servoj estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la delegito rezultantajn de la petita servo. Oni povas peri infomojn pri komerco, industrio, trafiko, laboro, dungado, salajroj, vojaĝoj, turismo, instruado, junulaj, studentaj, virinaj aferoj k.t.p. Oni ne povas peti informojn pri komerca pagokapablo kaj morala indeco de persono (konfidencaj informoj). La delegito ankaŭ rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia konscienco aŭ honoro. La delegitoj ankaŭ havigas Esperante parolantan helpanton al fremdlandaj vizitantoj, kaj ankaŭ cetere diversmaniere helpas ilin. La delegitojn en unu lando administras ĉefdelegito. Pro la delegita sistemo oni jam nun povas vojaĝi preskaŭ ĉie en la mondo per Esperanto.



Survoje al la akcepto far la antverpena unbestro :  
Zamenhof, Sebert, Boirac, Van der Biest (1911)

## *12. Esperanto inter la blinduloj*

Por la blinduloj Esperanto jam ludas pli gravan rolon ol por vidantoj. De 1904 profesoro Cart agadis por krei kunlaboradon inter la diverslandaj blinduloj per Esperanto ; sian agadon li komencis per Esperanta kurso por blinduloj en Lausanne. Post la kurso li fiksas la Esperantajn supersignitajn literojn en la brajla skribo, presigis brajlajn Esperanto-gramatikojn en diversaj lingvoj, kaj skribis al ĉiuj reĝinoj en Eŭropo, petante ilian financan apogon por sia laboro. La sveda kaj la rumana (Carmen Sylva) reĝinoj konsentis. De 1904 profesoro Cart eldonadis la brajle presitan "Esperanta Ligilo", kiu ekde 1912 estis redaktata kaj presata de la sveda presisto Harald Thilander. Li estis blinda kaj preskaŭ surda, sed tre energia, kaj li estas nun unu el la plej gravaj personoj en la blindula Esperanto-movado.

Baldaŭ la laboro de profesoro Cart portis fruktojn. Esperanto-kursoj okazis en pluraj blindullernejoj, kaj en diversaj urboj fondiĝis kluboj de blindaj esperantistoj. De 1921 la blinduloj ĉiujare havas sian propran Esperanto-

kongreson en la kadro de la Universala Kongreso. Grandaj blindulbibliotekoj nun havas multajn Esperanto-librojn kaj sendas ilin prunte al ĉiuj landoj. En 1924 fondiĝis Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (U.A.B.E.), kiu komencis eldoni neregulan informgazeton *Ligilo por Vidantoj*. En 1932 U.A.B.E. ŝanĝis sian nomon al *Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj* (U.A.B.O.), kiu havas reprezentantojn, delegitojn, en preskaŭ ĉiuj landoj. Esperanto nun estas instruata kiel deviga aŭ libervola fako en tre multaj blindullernejoj, i.a. en la norvega. La norvegaj blindaj esperantistoj estas organizitaj en Norvega Asocio de Blindaj Esperantistoj, kiu havas reprezentantojn en multaj urboj

### 13. Esperanto inter laboristoj

Estas kompreneble, ke laboristoj, kiuj ofte tute ne lernas fremdajn lingvojn, sentas specialan bezonon de Esperanto; kaj jam frue en diversaj lokoj fondiĝis laboristaj Esperanto-kluboj kun la celo disvastigi Esperanton inter la laboristoj. Sed kelkaj laboristaj esperantistoj volis akcenti ankaŭ en la Esperanto-movado la klasbatalan tendencon. Plej energia en tiu rilato estis la franca instruisto Lanti, laŭ kies iniciato en 1921 fondiĝis la Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.). La celo de tiu asocio estas 'utiligi praktike la lingvon Esperanto por la klas-saj celoj de la laboristaro tutmonda'. S.A.T. do ne laboras *por* Esperanto, sed *per* Esperanto por la klasbatalo de la laboristaro. Ĝi havas nur individuajn membrojn. Sed tute ne ĉiuj laboristaj esperantistoj aliĝis al S.A.T. Multaj restis sendependaj aŭ daŭrigis kunlabori en la neŭ-tralaj organizaĵoj, kiuj ne akceptis partian aŭ klasan vidpunkton.

En multaj landoj ekzistas ankaŭ landaj Laboristaj Esperantistaj Asocioj, kiuj ofte staris en opozicio al S.A.T. Sed en 1927 oni faris 'konvencion' inter S.A.T. kaj la landaj asocioj, laŭ kiu la asocioj laboras por disvastigi Esperanton inter la laboristoj de siaj landoj, kaj S.A.T. laboras per Esperanto por la klasbatalaj celoj de la laboristoj. De 1921 S.A.T. aranĝas ĉiujare siajn proprajn kongresojn; la unua okazis en Prago.

Ankaŭ en S.A.T. baldaŭ montriĝis la diversaj politikaj tendencoj de la laborista movado, kio kondukis al skismoj. Tiel ekz. en 1931 la komunistoj apartigis sin kaj fondis Internacion de la Proleta Esperantistaro (I.P.E.), kaj en 1932 ankaŭ la socialistoj, kiuj fondis Internacion de la Socialistaj Esperantistoj (I.S.E.)

S.A.T. havas propran eldonejon. Ĝia plej grava eldonaĵo estas la *Plena Vortaro de*

*Esperanto*. Krome S.A.T. eldonas la ĉiusemajnan gazeton *Sennaciulo* kaj la monatan literaturan revuon *Sennacieca Revuo*.

En Rusujo S.A.T. komence trovis grandan simpation, kaj la Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (S.E.U.) bone kunlaboris kun ĝi. Sed poste ekestis malpaco, kaj la rusoj retiris sin el S.A.T. Ĉar S.E.U. en 1923 ankaŭ malpermesis la agadon de U.E.A en Rusujo, la cetera mondo poste havis malmultan kontakton kun la rusaj esperantistoj.

La rusa registaro montris certan simpation al Esperanto. Ekz. la rusa poŝto eldonis poŝtkartojn kun Esperanto-teksto kaj, en 1927, poŝtmarkon kun la portreto de D-ro Zamenhof okaze de la 40-jara jubileo de Esperanto.

(Laŭ *Stoep-Bowitz kaj Isbrücker*)

## Novaĵoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

**Japanio** : *Esperantaj sumoo-konkursoj* –

Sumoo estas japana tradicia lukto. En ĉiu jaro okazas ses konkursoj en la neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn. Mi inventis la Esperanto-sumoon. Ĉu vi ne deziras partopreni en ĝi ?

1. La celo de tiuj konkursoj : stimuli la esperantistojn legi libron kun ĝojo.



2. Luktomaniero : elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso, kaj decidu, kiom da paĝoj vi legos ĉiutage laŭ via kapablo. Se vi legos pli ol la promesitajn paĝojn ĝis la noktomezo de tiu

tago, vi atingos unu venkon, se ne, unu malvenkon. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi ne luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

3. Aliĝo: sendu jenajn informojn al HORI Jasuo, [huri-zonto@water.sannet.ne.jp](mailto:huri-zonto@water.sannet.ne.jp) :

- via nomo, luktista nomo, sekso, lando, urbo, retadreso,

- la titolo de la libro kiun vi legos, kaj kiom da paĝoj vi legos.

4. Ĝisnuna rezulto : jam okazis 23 esperantaj sumoo-konkursoj. Lastatempe averaĝe 120 homoj el pli ol 20 landoj partoprenis kaj legis entute 10.000 paĝojn. Supozeble dum la pasintaj tri jaroj jam estis legitaj 200.000 paĝojn.

La septembra sumoo okazis ekde la 15-a ĝis la 29-a de septembro.

Vizitu nian TTT-ejon por pli da informoj pri la Esperanto-sumoo : <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html> .

*Hori Jasuo*

**Slovenio** : *Popoliniciato pri baza enspezo* –

Mi sendos al vi ligilon cele al kolektado de subskriboj por nova eŭropa popoliniciato (tia kian EEU volis organizi por la Esperante-kantata eŭropa himno) pri la enkonduko de universala baza enspezo, do iu minimuma enspezo, kiun denaske havos chiu eŭropano kaj per kiu eblos travivi, se li ne trovas laborpostenon.

Sekve oni solvos la problemon de senlaboreco, char neniu devus labori. Tiuj kiuj volus, perlaborus pli. Sed ne plu eblus ekspluatado, char la laboradantoj devus oferti homajn kondiĉojn kaj sufiche altan salajron por akcepti laboriston. <http://sign.basicincome2013.eu/> .

Mi persone subtenas tiun iniciaton kaj rekomendas al ĉiuj amikoj agi same.

*Zlatko Tišjlar*

**Austrio** : *Nova direktoro de la Eo-muzeo* –

Mi povas informi vin pro tio, ke la Kolekto de Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo havas novan direktoron : D-ro Bernhard Fetz. Ĉiujn tiurilatajn informojn vi trovos en la apendico en la germana lingvo kaj en Esperanto.

La direktoro de la Literatura Arkivo de la Aŭstra Nacia Biblioteko, privata docento d-ro Bernhard Fetz, transprenis je la 1-a de aŭgusto 2013 ankaŭ la direktorecon de la Kolekto de




Planlingvoj kaj de la Esperanto-muzeo de la Aŭstra Nacia Biblioteko. En tiu funkcio li sekvas la kortegan konsiliston, magistron Herbert Mayer, kiu fine de julio 2013 emeritiĝis. Por pliaj informoj vizitu mian retadreson [thomas.zauner@onb.ac.at](mailto:thomas.zauner@onb.ac.at) aŭ la retejon [www.onb.ac.at](http://www.onb.ac.at) . *Mag. Thomas Zauner*

**Islando** : *Nova redaktoro por 'Esperanto'* –

Unuafoje en pli ol cent jaroj la revuo *Esperanto* havas redaktoron ekster Eŭropo. La brazilano Fabricio Valle estis elektita de la nova estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček ekde la jarokolekto 2014.

“Jam en sia skriba sinprezento Fabricio Valle montris grandan energion kaj kreemon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro”, komentis la nova prezidanto de UEA, Mark Fettes. “Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero.”

Valle estas unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro (unu pli ol anoncite en pli frua komuniko). Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de la Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficisto de la Brazila Esperanto-Ligo (1996-2001) kaj prezidanto de Federacia Konsilantaro de BEL (2001-2004). Li fondis propran eldonentreprenon, “Zamenhof Editores” kaj gvidis ĝin de 1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provoj kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo “Intraespo”. La redaktoraĵoj de Valle estas videblaj



en la ok numeroj de *Brazila Esperantisto*, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-2002. Endukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave. Ankaŭ por la revuo *Esperanto Valle* antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu “transformiĝos en aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la movadaj organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranoj kaj komencantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantistoj”.

*Komuniko de la CO de UEA.*

#### Usono – Kunlaboro kun ESF<sup>1</sup> –

Ni ĝojis revidi kelkajn amikojn dum la UK en Rejkjaviko kaj aliajn dum la landa kongreso de Esperanto-Usono en Raleigh<sup>2</sup>, kie ankaŭ kunvenis la ESF-estraro. La homoj kiuj ĉeestis tiujn eventojn, certe memoras, ke ESF strebas informi la Esperanto-komunumon pri sia laboro kaj invitas esperantistojn kunlabori kun ĝi. Tiu ĉi leteron estas plia paŝo en tiu direkto.

La ESF-laboro grandparte okazas ekster la kutimaj limoj de la Esperanto-movado. Unu ekzemplo estas, ke ni strebas influu la akademian komunumon kaj formi publikan opinionon pri lingvoj kaj lingva egaleco. Kelkaj el niaj projektoj tamen havas rektan ligon kun Esperanto kaj donas praktikan valoron al la komunumo de la Esperanto-parolantoj, ekzemple:

**Lernu.net.** Multe pli ol esperanta retlernejo *lernu!* estas komunumo de pli ol 150.000 registritaj uzantoj el 200 landoj. Ĉi-aŭguste ĝi ricevis de UEA la Premion Deguĉi pro ĝiaj kontribuoj al la interkultura interkompreniĝo tutmonda.

**Edukado.net.** Riĉa je rimedoj por instruistoj kaj kun komunumo de pli ol 3000 Esperanto-instruistoj kaj lernantoj. Edukado.net estas eniata de multaj pli grandaj lingvolernaj retejoj.

**Tekstaro.com.** La korpuso de pli ol kvar milionoj da vortoj de skribita Esperanto. Tekstaro povas helpi al vi trovi, kiel certa vorto aŭ frazo estas uzata en la Esperanta literaturo de la Zamenhofa tempo ĝis nun.


**NASK.** La Nord-Amerika Somera Kursaro estas unu el la plej konataj Esperanto-lernejoj en la mondo, kiu okazas ĉiujare ekde 1969.

Ni invitas vin fariĝi regula uzanto de tiuj projektoj, diskonigi informojn pri ili, informi la ESF-agado, volontuli kiel instruisto aŭ tradukisto de Lernu.net aŭ provizi Edukado.net aŭ Madiateko per materialo kaj informoj, kaj laste subteni ESF-on per viaj donacoj ! Vi povas donaci rete per [esperantic.org/donacoj](http://esperantic.org/donacoj) aŭ [wally.du.temple@esperantic.studies.org](mailto:wally.du.temple@esperantic.studies.org). Dankon pro via subteno kaj intereso.

*Mark Fettes, prezidanto de ESF*

#### Pieter Bruegel naskiĝis en Peer (*Pieter Bruegel werd geboren in Peer*)

Tri vilaĝoj kandidatiĝas por esti la naskiĝloko de la mondfama pentristo, Pieter Bruegel la Maljuna. Jam estis indikoj, ke li naskiĝis en Grote-Brogel, vilaĝo apartenanta al la komunumo Peer en la belga Limburgo, sed nun Paul Capals el Grote-Brogel liveras konvinkantajn novajn pruvojn.



Paul Capals en la Bruegel-Domo en Peer.

“Pieter Bruegel la Maljuna vivis de ĉ. 1527 ĝis 1569,” diras Capals. “La loka buŝa tradicio ankoraŭ nun asertas, ke la pentristo naskiĝis en la farmo *den Ooievaarsnest* (la Cikonia Nesto) en Grote Brogel, sed ne ekzistas sciencaj pruvoj por tio. Jam ekde 25 jaroj mi disvolvis pasion por Pieter Bruegel, kio kondukis al pluraj publikaĵoj. Tiel mi konvinkiĝis, ke leteroj kaj tekstoj de samtempuloj liaj povus kaŭzi tra-

<sup>1</sup> Esperantic Studies Foundation

<sup>2</sup> Ĉefurbo de la usona ŝtato Norda-Karolino

rompon. Tial mi studis la skribaĵojn i.a. de Domenicus Lampsonius, samtempulo de Bruegel. En 1572 li skribas ke Bruegel naskiĝis en Bruegel ne tre for de Breda. Kiel multaj pentristoj, li adoptis kiel familian nomon la nomon de sia naskiĝloko, Bruegel.

Sed estas du urboj kiuj nomiĝis Breda en tiu tempo : Breda en Nederlando kaj Bree en la belga Limburgo, kiu troviĝas je 6 km de Grote-Brogel. Ankaŭ en Nord-Brabant troviĝas vilaĝo kun la nomo Breugel. Sed nur al Bree ĉiuj indikoj aplikeblas. Tiutempe la nomo estis prononcata kiel [brügel], kun germana ŭ kaj ne kun la germanan ö kiel oni prononcas ĝin nun. Ankaŭ nun la nomo de la vilaĝo estas prononcata 'Bruegel' ! *Paul Capals*

## Lingvo sen popolo

*(Een taal zonder volk)*


Kiu lingvo estas relative facila, belsona kaj tute logika, estas parolata de milionoj da homoj en la mondo kaj (eble) LA solvo por la eŭropa problemo de la lingva konfuzo ? – Esperanto !

Iuvespere en Loveno-la-Nova en duone homplena kurssalono Claude Piron, psikologo kaj esperantisto, komike sed senkompatate demonstris la perfektan maladekvatecon de la angla kiel internacia lingvo. Li sciis, pri kio li parolas. Tre longe li estis interpretisto ĉe UN kaj TOS (Tutmonda Organizaĵo de Sano) por la rusa, ĉina, hispana kaj angla lingvoj.

“...kaj antaŭ tiu kompleta asembleo de siaj kolegoj,” Piron plu rakontas, “la dana ministro, tre fiera preni sur sin sian novan respondecon, solene deklaris : ‘Well, I’m at the beginning of my period... !’ En Esperanto: ‘Mi estas ĉe la komenco de mia menstruo’, sed li volis diri : ‘Mi komencas ekzerci mian funkcion’.

“Felicite liaj pej multaj kolegoj ne sufiĉe sciis la anglan kaj tute ne reagis. Ha ! Tiu lingvo de Ŝekspiro ! Ne kontenta pri tio ke ghi enhavas amason da esceptoj, malregulaĵoj, falsaj amikoj kaj idiotismoj (esprimoj kies signifo neniam estas konforma al ilia simpla traduko), la angla estas plenplena je mallongaj vortoj kiujn estas neeble tuj malkodi de la plej multaj homoj. Kiam en kompleksa frazo Brito diras [rlait], kvazaŭ li havus enorman brulantan terpomon en sia buŝo, lia konversacipartnero havas du sekundojn por diveni, ĉu li parolas pri ‘rajto’, ‘lumo’ aŭ volas diri ‘skribi’...

“Kaj kion pensi pri la deprimentaj statistikoj?



Kvankam 92% de la lernantoj en la tuta mondo lernas la anglan, la angla ne lasas sin facile malsovaĝigi. Malgraŭ enormaj klopodoj asimili tiun idiomon, nur unu el cent junaj eŭropanoj sukcesas fine de siaj studoj pli-malpli korekte paroli ghin La tuta vastejo kiu separas *I worked hard* kaj *I hardly worked* (mi diligente laboris – mi apenaŭ laboris) kaj multaj similaj aferoj malesperigas neanglalingvanojn. Konkize dirite, la lernado de la angla en la lernejoj ne sufiĉas por domini dum negoco nek por konversacii sen ŝajni priridinda,” konkludas la preleganto.

Claude Piron ne estas malamiko de la regatoj de Ŝia Gracia Reĝa Moŝto. Sed li simple koletras. Ĉiujare milionoj da kuraĝuloj investas multan tempon en la lernadon de tiu malmulte manipulebla lingvo, kiu amasigas la kaptilojn, kaj kiun ili neniam parolos elegante. Kia perdo de energio, dum ekzistas bona alternativo tute preta : Esperanto, kiu estas jam remarkinde multe uzata ĉie en la mondo de amasego da entuziasmaj parolantoj (inter 2 kaj 10 milionoj laŭ la taksoj. Libera je sensencaj kapricoj, supla, riĉa, facila kaj kohera, Esperanto malhavas ĉiujn kondiĉitajn refleksojn, kiuj venas la plimulton de la naciaj lingvoj. Ĝi povas esti lernita en rekordtempo : 150 horoj, aŭ dum dekfoje malpli da tempo ol la plimulto de ĝiaj konkurenculoj. Laŭdire Leo Tolstoj lernis ĝin dum unu posttagmezo ! Ĝiaj dek ses gramatikaj reguloj okupas unu paĝon. Ĝia vortaro, kiu depruntas multajn hind-eŭropajn radikojn, konstruiĝas kiel Lego-ludilo – kio estas la principo de la aglutinaj lingvoj kiel la finna, la hungara, la japana, la turka, la eŭska, kiuj senfine apudmetas nevariantajn elementojn. Ĉiu litero korespondas nur al unu sono kaj estas aparte prononcata. Ĝia fonologio multe

similas al tiu de la itala, la plej klara kaj belsona lingvo en la mondo...

Konceptita en 1887 de pola okulisto, rekonita ekde 1924 de la sciencistoj de la Franca Scienca Akademio kiel "majstroverko de logiko kaj simpleco", Esperanto tamen ne sukcesas trudi sin. Koncerne lingvon kiu kunigas tiom da bonaj kvalitoj sen iam povi trarompi, oni kompreneble demandas sin pri la kaŭzoj kiuj daŭre malebligas ĝian akcepton. Por multaj esperantistoj ili estas nur politikaj. Efektive, lingvo estas armilo. Mastri la dominantan lingvon signifas teni parteton de la potenco. Malbone paroli ĝin kontraŭe estas ŝajni idioto.

Nuntempe dum la internaciaj kunvenoj 58% de la intervenoj estas farataj de veraj anglosaksoj. Tial por povi havi voĉon en la ĉapitro, la plej multaj ŝtatoj igas prezenti sin de denaskaj anglolingvanoj. Tiu kutimo altrudita de la angla, kiu malfavoras ĉiujn kiuj ne lernis ĝin ekde la lulilo, estas ne nur maljusta. Ĝi ankaŭ kontraŭas la spiriton ĉe la bazo de la konstruo de Eŭropo, kiu jam ĉiam permesis, malgraŭ la astronoma kosto de la tradukoj, ke la delegitoj de la ŝtatoj-membroj esprimas sin en sia nacia lingvo. Sed la vento turniĝis. Jam de pluraj jaroj la estontaj membroj de la Eŭropa Unio devas prezenti sian kandidatecon en la angla. Tamen la institucioj kiuj dependas de ili laboras en 25 lingvoj. Kio donas  $25 \times 24 = 600$  konektoj por ĉiu mikrofono ! Help !

Decidinte malpliigi la koston de tradukado, kiu estas pli ol miliardo da eŭroj ĉiutage, kaj samtempe garantii egalecon al ĉiuj membroj, la anglosaksoj klare difinis lingvan politikon kiu intencas konvinki siajn partnerojn adopti la anglan kiel la unuan lingvon de la Unio. En 2000 Margaret Thatcher senĝene konfirmis tiun ĉi hegemonian objektivan : "En la XXI-a jarcento la domina potenco estas Usono, la domina lingvo la angla kaj la ekonomia modelo la anglo-saksa kapitalismo."

Esperanto, kiu ne intencas anstataŭi la naciajn lingvojn kaj kiu povas esti uzata dum ĉiuj internaciaj intertraktoj sen ke la malplej granda supereco sentiĝas, estas nek la produkto de nacio kun imperialistaj celoj nek la esprimo de iu ajn ideologio. Ĝia handikapo estas samtempe ĝia forto. Ĉar Esperanto ne estas subtenata de politika kaj ekonomia forto, ĝi ne altiras la potenculojn. Ĝi vere estas la lingvo de la ordinaraj homoj. Ĝi estas humana lingvo, konceptita por simplaj homoj, inter kiuj multaj

*Met de hartelijke groeten van  
Kun la koraj salutoj de*

**KBC-Bank Hechtel**

Rode Kruisplein 5  
B-3940 Hechtel  
Tel. 011-73.02.20  
Fax 011-73.02.21  
[hechtel@kbc.be](mailto:hechtel@kbc.be)

havas nek la talenton por lerni lingvojn nek la rimedojn por pagi privatitan kurson ?.

Denis Flocon, kiu instruas Esperanton en la universitato Notre-Dame de Paix en Namuro (Belgio), emfazas la mondanan, fratecan flankon de la vasta Esperanto-movado. Li diras: "La esperantistoj vere deziras, ke ĉiuj popoloj interkomunikiĝas egalnivele. Tial ili aliras alinaciuojn respektante la diferencojn. La granda publiko, kiu ankoraŭ ne akceptas Esperanton, ne scias, ke multas la internaciaj kontaktoj inter la esperantistoj en la tuta mondo per korespondado, kongresoj kaj *Pasporta Servo*." Tiu servo eldonas libron kun la adreso de ĉiuj Esperantistoj en la mondo (pli ol mil) kiuj pretas akcepti senpage aliajn gesamideanojn en sia domo. Flocon mem vojaĝis dum semajnoj loĝante ĉe aliaj esperantistoj en Hindio, Ĉinio, Rusio, Kanado. Claude Piron mem ricevis en tiu lingvo la konfidencojn de brazilanoj, irananoj, japananoj, uzbekoj kaj poloj. Ili estis la plej spontaneaj kaj profundaj konversacioj, kiujn li iam havis.

Unu el la plej famaj partizanoj de la lingvo, profesoro Umberto Eco, diras, ke, se en la Eŭropa Unio ĉiuj landoj rifuzus akcepti kiel komunan lingvon la lingvon de alia ŝtato-membro, oni finfine akceptus la ideon de komplete regula artefarita lingvo. Necesas nur pacienco : la arabaj ciferoj finfine anstataŭis la romajn, la metrika sistemo forbalais la arbitrajn mezurunuecojn. Fine prudento gajnos...

*Valérie Colin*

**Nia rakonto: Malagrabra viro (1)**

***Ons verhaal : 'n Onaangename man (1)***

Nekompreneble multaj homoj havas familiajn rilatojn, amikojn aŭ konatojn en Amsterdamo. Estas fenomeno, kiun mi simple imputas al la granda nombro da loĝantoj en tiu ĉefurbo.

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj mi havis tie malproksiman kuzon. Kie li troviĝas nun, mi ne scias. Mi kredas, ke li iris al Okcidenta Hindio. Eble iu el miaj gelegantoj donis al li leterojn por kunpreni tien. Ĉiakaze li aŭ ŝi havis akuratan, sed malafablan leterportanton, kiel tio verŝajne klariĝos el tiuj ĉi paĝoj. Efektive mi konas multajn homojn, kiuj alte laŭdis siajn amsterdamajn kuzojn, precipe se ili apartenis al la legantoj de *Felix meritis*<sup>3</sup>, aŭ se ili disponas pri veturilo. Sed mi ofte miris pri mia tro granda nekoreco kontraŭ la persono de mia kuzo, Roberto Nurks<sup>4</sup>. Nenio estis pli terura ol tio, ke li sendis al mi iun sabaton tagmeze per diligenco brikon kun letero<sup>5</sup>, informante min, ke li (se la vetero restus bela kaj ne intervenus ia neatendata okazaĵo – kio neniam okazis –) venos pasigi la tagon kun mi en la Harlema Arbaro. Mi havis nenion kontraŭ la menciita arbaro, sed jes kontraŭ tiu vizito.

Sed tamen li estis la plej kora, honesta, fidela knabo, korekta en siaj aferoj, strikta en siaj moroj kaj religiemo kaj eĉ funde bonkora. Sed estis en li io, mi ne scias kion, sed kio faris, ke mi ne sentis min komforta kun li; io malfacila, io impertinenta, en unu vorto io perfekte malagraba.

Se mi ekzemple aĉetus novan ĉapelon de ne ekstravaganta fasono (ekzemple nenacian ĉapelon<sup>6</sup>), kun ne tro alta kaj ne tro plata globo, kun ne tro larĝa aŭ tro mallarĝa rando, ĉapelon taŭgan por esti demetita antaŭ prudenta viro kaj tenata sur la kapo antaŭ stultulo, sed tamen ĉapelon pri kiu oni povus diri nenion. Mi estis konvinkita, ke mia aminda kuzo Roberto Nurks, ĉe la unua okazo, kiam li vidus min kun ĝi, kun la plej malama rideto de la mondo kaj kun speco de malkontenta miro dirus: “Kian diable priridindan ĉapelon vi surhavas!”

Kvankam mi volonte konfesas, ke unu homo kondutas pli lerte en tia situacio, ol alia, kaj mi ne estas la plej lerta persono, nun estas nekompreneble malfacile fari bonan impreson post tia kritika eldiro pri mia ĉapelo. Serioze defendi mian ĉapelon ŝajnus al mi tro stulte. Reagi per “Ĉu vi trovas?” perfidus kompletan mankon je spriteco. Repliki per insulta rimarko pri la ĉapelo de la kritikanto estus tro bubaĉe. Kaj kvankam diri ion spiritan estus la plej bona reago, kaj ekzistas amaso da eblaj spritaĵoj,

estas tamen rimarkinde, kiel malmultajn da ili en tia momento oni trovas. Tiel ke la kritikanto kutime spertas la plezuron vidi, ke li kaŭzis etan ĝenon, kiun li ĝuas kun diabla volupto.

Se per tiu ĉi malgranda ekzemplo de mia ĉapelo – okulfrapas, kiel ofte ĉapeloj servas kiel ekzemploj – vi ne ricevus iom klaran bildon pri la karaktero de mia kuzo Nurks, la tuta historio, kiun mi estas skribonta, estus vana tempoperdo por vi, kara leganto, kaj tiam, por puni vin, mi konsiderus vin kiel trafan portreton kaj reproduktajn de Roberto Nurks.



Nicolaas Beets (pseŭdonimo Hildebrand)  
(Haarlemo 1814 – Utreĥto 0903)

Intertempe oni erarus, se oni imagus tiun dignan amsterdaman knabon kiel malfeliĉan, malkontentan aŭ pesimisman personon. Li estis nur malaminda, kaj tio nur pro malbona kutimo, parte pro profunda kaj eble eĉ al li mem kaŝita ĵaluzeco. Li tute ne estis hipoĥondriulo, sed ĉiam gajhumora kaj ŝatanta de gajeco. Sed li ŝajnis ŝati kaŭzi etajn ĉagrenojn al siaj amikoj, kaj ne nur al siaj amikoj, sed ĝenerale al la plej benignaj homoj en la mondo. Eduko super lia socia rango, mi kredas, donis al li tiun arogantecon, kaj liaj malsaĝaj gepatraj tro frue kutimigis lin al tio, ke li povis doni sian junan juĝon pri ĉiuj personoj kiuj vizitis ilian domon. Tial li havis nenion de tiu delikata, rezerviĝema skrupululo, kiu same tiom timas ofendi kiom esti ofendita, nenion de tiu milda huma-

<sup>3</sup> Latina esprimo por “feliĉa pro siaj meritoj”

<sup>4</sup> La nederlanda adjektivo *nurks* signifas ‘malagraba, grumblema, malkontenta’.

<sup>5</sup> Oni faris tion, ĉar la diligenco ne transportis leterojn, sed nur paketojn.

<sup>6</sup> En 1831 oni provis enkonduki en Nederlandon nacian ĉapelon sekve de la Belga revolucio.



neco, kiun oni, malgraŭ la aŭtoritato de ĉiuj maksimumoj kiel *ingenuas didicisse fideliter artes mollit mores nec sinit esse feros*<sup>7</sup>, oni prefere transprenas de sia patrino ol de la klasika literaturo. Cetere li komprenis tre malmulte de la latina lingvo.

Se Roberto Nurks estus certa, ke vi estas duone enamiĝinta, li trovus okazon menciigi dum konversacio la objekton de via silenta afekcio kun la pro vi dolorigaj adjektivoj “malbela, malsaĝa, sensignifa” kaj similaj. Se li konus vian preferatan aŭtoron, li citus en kompanio el liaj verkoj la plej malbelajn partojn, aldirante, «la de Hildebrand alte laŭdata aŭtoro diras tion aŭ tion ĉi». Se vi kuraĝus rakonti malnovan anekdoton, kiu estintece donis al vi multan plezuron, por kiu vi sentis ankoraŭ iom da afekcio kaj de kiu vi atendis ankoraŭ ĉi-foje iom da gajeco, ĉar ĉiuj ŝajnis pro ĝentileco ankoraŭ ne koni ĝin, li fuŝis ĝian efekton, rapide finante ĝin antaŭ vi ĝuste antaŭ la klimakso, kaj parolante pri la unua jaro de la almanako de Enkhuizen, li dirus, ke ĉiuj anekdotoj en ĝi estas malspritaĵoj, kaj ke tiu ĉi estas unu, kiun li jam centfoje aŭdis min rakonti. Konkize dirite, li konis ĉiujn malfortajn flankojn de via familio, de via intelekto, de via koro, de via hobbio, de via studo, de via profesio, de via korpo kaj de via vestoŝranko, kaj malice ĝojis menciigi ilin laŭvice. Kaj mi ne scias, kiun sorĉan aŭ magnetan forton li praktikis por fari vin tute sendefenda.

Verŝajne estis pasintaj tri jaroj – mi devas ekonomie manipuli la jarojn, ĉar mi estas ankoraŭ tiel juna – ekde kiam mia kuzo Nurks denove sendis al mi brikon sabaton, la 14-an de julio – vi povas konsulti la daton en la almanako pro kontroli, ĉu mi diras la veron –, kiu ankaŭ kiel briko falis sur mian koron. Li estis venonta la morgaŭon post la matena diservo kaj forironta la vesperon per la veturilo de la oka horo. La horojn inter la du momentoj ni estis oferontaj al nia amikeco kaj plezuro.

Sed intertempe mi estis farinta planon pro alia amikeco kaj alia plezuro. En mia domo mi gastigis amikon el Lejdeno, kun kiu mi estis tagmanĝonta en la taverno Zomerzorg kaj poste promenonta tra Velzerend al Velzen, kie ni estis pasigontaj la nokton, kaj de kie, la sekvantan matenon, ni estis irontaj al Breezaap<sup>8</sup> por tiu botanikumi, kion ni ambaŭ multe

ŝatis. Mi esperas, ke neniu el miaj gelegantoj malestimos min pro tio laŭ la kutimo de multaj homoj, kiuj dubas pri la valoro kaj kvalito de plezuroj, kiujn ili ne kapablas prijuĝi. Mia kuzo Nurks apartenis al ili.

La menciita plano estis farita kun granda eksciteco kaj reciproka aprobo. Estis kvazaŭ niaj animoj kunfandiĝus en ĝi. Mi promesis al mia kolego-medicina studento, kies nomon mi devas prisilenti, ĉar li timas la insultojn de la recen-zistoj, kaj kiun mi tial pro oportuneco nomas Boerhave. Mi do promesis al Boerhave montri al li, krom la trezoroj de Breezaap, ankaŭ la ankoraŭ florantaj ekzemploj de la Aristo-lochia Clematitis, floro kiu kreskis survoje de Zomerzorg al Velzerend, kaj, tial ke li estis ankaŭ kolektanto de konkoj, li multe miris, kiam mi certigis lin, ke sur la Blujaj Ŝtupoj<sup>9</sup> la limakoj rampas sur oniaj botoj, kvazaŭ tio estus normala afero.

Sed tiu briko el Amsterdamo nuligis ĉiujn tiujn plezurojn, kaj la tuta plano devis esti prokrastita pro la penso, terura por mi, ke mi devis pasigi la tutan tagon en la Harlema Arbaro, ĉar nur tie promenas decaj Amsterdamanoj.

La ofero estis doloriga por mi, kaj mi suspektis ke la ĉarma Boerhave, kiu ne sentis sangoligon kiel mi kaj krome senlime ŝatis la sciencan kiun li praktikis, havis la sekretan deziron, ke mia kara kuzo Nurks, de kiu li duone instinkte, duone pro miaj klaĉoj, ne atendis multan bonon, povu ekhavi inter sabatovespere kaj dimanĉomane ian mal-saneton, kiu decidigos lin skribi letereton por la unua boato, por anonci, ke li ne venos. Sed mi deziris al mia kuzo la plej agrablan kamparan societon, plenan je amuzajoj, aŭ plezurigan tagmanĝon en la gastejo Berenbijt kun tri membroj de la societo *Munt* kaj sep de la societo *Doctrina et Amicitia*<sup>10</sup>, kies membroj povis tre sprite incitigi unuj la aliajn, laŭdante sian propran societon je la granda frustracio de la dek-unua viro, kiu membris en ambaŭ societoj kaj deziris pravigi la Doktrinanojn, ĉar ili estis la plimulto, sed ne volis malfideliĝi al la Muntanoj, ĉar ili estis la plej grandaj sinjoroj. En tiu kompanio mia kuzo Nurks, kiu havis la avantaĝon de la universaleco, estus havonta la okazon malpezigi sian koron al malfacila, dika viro, onklo de unu el la gastoj, kiu jam estis

<sup>7</sup> Latina verso de Ovidio, en Esperanto : *fidela studo de beletro mildigas la morojn kaj evitas, ke ili fariĝu sovaĝaj*.

<sup>8</sup> Dunvalo inter Velsen kaj Beverwijk (Norda-Hollando).

<sup>9</sup> Dunoj apud Velzerend en Kennemerland.

<sup>10</sup> Latina por ‘doktrino kaj amikeco’.

leganta la Harleman Gazeton, kiam li mem volis legi ĝin, kaj la netolereble longa junulo, plena kuzo de alia ĉeestanto, kiu ĉiam deziris ludi poton<sup>11</sup>, kiam li mem apenaŭ estis komecinta ludi karambolon. Tamen estis aŭntaŭdestinite, ke li pasigos la dimanĉon, 15-an de julio en la Harlema Arbaro.

“Ha ! Kiel vi fartas, Roberto !” mi ekkriis, kiam li eniris. “Jen mia amiko, la studento Boerhave. Boerhave, jen mia kuzo Roberto!”

Ĉu estis falseco, ke mi kore akceptis lin ? Mi kredas, ke ne. Kiam mi forlasis la planon pri Zomerzorg kaj Breezaap kaj li vere estis tie, mi elektis la plej bonan flankon. Cetere mi tre longe ne vidis lin.

“Kara knabo, bonan tagon. Sinjoro, via servisto ! Knaboj, kiel tiu vojo de la Amsterdama pordego ĝis ĉi tie denove estis longa !”

“La Sinjoro verŝajne kutimas al longaj vojoj,” rimarkis Boerhave, mi kredas, por montri sian geografian konon de la ĉefurbo.

“Jes, estas tiel,” respondis Nurks, speciale emfazante la vorton ‘estas’. “Sed ĝuste tial ke oni honoras nur malgrandan urbeton kiel Harlemon, oni preferus ne fari tion.”

Li ĵetis rigardon sur la spegulon. Lia kolumo estis suferinta pro la granda varmo. Estis varmege en tiu tago, ĉefe en la diliĝencoj. Lia kolumo pendis trans la rando de lia kravato.

“Stultaj aferoj, tiuj kolumoj. Cetere ili estas elegantaj kaj de tre bona fasono. Tial mi ŝatas tiujn rondajn kolumojn<sup>12</sup>.”

Al Boerhave kaj la humila loĝanto de la pririndinde malgranda urbeto, ili tamen bone sidis. Sed li ŝajnis ne rimarki tion.

*Hildebrand (daŭrigota)*

Ne forgesu pagi al FEL vian ĉiujaran membro-kotizon de € 25,00 al KBC 402-5510531-55 aŭ Fortis 001-2376527-06. Se vi membriĝas nur ĉe LEA la kotizo estas € 12,50, pagendaj al KBC 735-0190144-12. Koran antaŭan dankon !

## Aktivajoj de LEA 2013-2014

### Pasintaj aktivajoj

#### Ĵaŭdon, la 26.09.2013: Prelego

Thierry Saladin el Montpeliero (Francio) parolis pri peticio lanĉita de portorika knabo, Joannès : “Esperanto, komuna lingvo de Eŭropa, tuj !” Li petas ĉiujn esperantistojn en la mondo subskribi tiun peticion por postuli de la Eŭropa Unio akcepti Esperanton kiel komunan lingvon. Ankaŭ neesperantistoj povas subskribi ĝin.

#### Ĵaŭdon, la 31.10.2013 : Skrabloludo

Ni ludis skrablolon per esperantaj vortoj sur speciala tabulo farita de An Olijslagers.

### Estontaj aktivajoj

#### Ĵaŭdon, la 28.11.2013 :

Rob Ketelaer el Nederlando agrable okupos nin per la esperantaj proverboj de Zamenhof.

#### Ĵaŭdon, la 12.12.2013 : Festeno

Zamenhoffesto okaze de la 154-a naskiĝdatreveno de D-ro Zamenhof. Loko : restaŭracio “De Boskop”, Markt 1, Peer. Ĉiu manĝas kaj trinkas laŭdezire.

#### Ĵaŭdon, la 30.01.2014 : Prelego

Pieter Jan Doumen prelegos pri la Arkeo de Noa, trovita de Rusa ekspedicio en 1917.

#### Ĵaŭdon, la 27.02.2014 : Kvizo

Henri Schutters gvidos kvizon en Esperanto pri ĝeneralaj temoj.

#### Ĵaŭdon, la 27.03.2014 : Prelego

An Olijslagers prelegos pri sia perkomputila kontakto kun *locked-in* persons, t.e. personoj kiu ne kapablas kontakti kun la ekstera mondo.

#### Ĵaŭdon, la 24.04.2014 : Kartludo

Rik Leijskens gvidos la kartludon “Ĵokero”.

#### Ĵaŭdon, la 29.05.2014 : Kantovespero

Sur sia gitaro Paul Hotterbeekx akompanos la esperantlingvan kantadon, kiun gvidos Pieter Jan Doumen.

#### Ĵaŭdon, la 26.06.2014 : Promenado

Por fini la laborjaron ni faros promenadon tra la rezervejo “De Wulp” en Neerpelt. Gvidisto : Paul Hotterbeekx.

*La kunvenoj okazos je 20h00 en la Kultura Centro de Peer, Zuidervest 2A, 3990 Peer. Ĉiuj esperantistoj estas tutkore bonvenaj!*

<sup>11</sup> Malmoderna bilardludo. Ĉiuj ludantoj kunmetis monon, nomatan ‘poto’, pro kiu oni ludis.

<sup>12</sup> La tiutempa modo preskribis vertikalajn rigidajn kolumojn, nomatajn ‘patromortigiloj’ pro ilia mal-

komforteco. Male al kolumoj kun akraj pintoj, tiu de Nurks havis rondajn pintojn.

## Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono  
Redaktore...  
Plua historio de Esperanto (7) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 3: Novaĵoj el Esperantolando:  
- Japanio : Esperantaj sumoo-konkursoj (*Hori Jasuo*)
- Paĝo 4 - Slovenio : Popoliniciato pri baza enspezo (*Zlatko Tišljar*)  
- Aŭstrio : Nova direktoro de la Eo-muzeo (*Mag. Thomas Zauner*)  
- Islando : Nova redaktoro por ‘Esperanto’ (*Komuniko de la CO de UEA*)
- Paĝo 5: - Usono : Kunlaboru kun ESF (*Mark Fettes*)  
Pieter Bruegel naskiĝis en Peer (*laŭ Paul Capals*)
- Paĝo 6 : Lingvo sen popolo (*laŭ Valérie Colin*)
- Paĝo 7 : Nia rakonto: Malagrabra viro (*Hildebrand*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio (LEA) 2013-2014
- 

### Lernu Esperanton!

*Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.*

### Leer Esperanto!

*Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.*

### Apprends l’Espéranto!

*Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.*